

# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago №12 Decembro, 2009

*Kara Leganto, denove oni devas konstati pri la foriro de ankoraŭ unu monato, sed venis Decembro, meze de kiu niaj gesamideanoj tra la tuta mondo festos la Zamenhofan tagon kaj, samtempe, Tagon de la E-libro. Dum ĉi jubilea jaro kaj Tago de nia Majstro ni atendas gravajn gastojn (informo pri tio bonvolu legi sube). Ni volas esprimi kelkajn gajajn kaj malĝojajn faktojn de nia E-societo. Jam tradicie (kiel pasintjare) s-ro G. Dolgin verkis interesan rakonton por nia bulteno, sed... ĉi numero estas la lasta, kiun kunredaktas nia vic-prezidanto d-ro Puramo Chong – li jam translokiĝis al la ĉefurbo – Vaŝingtono. Koran dankon al vi, nia kara samideano kaj verva Esperantisto! Due, ni ne scipovis elekti estraron de la E-societo por la sekvantaj du jaroj pro la foresto de kvorumo. Espereble, ni faros tiun (balotadon) dum Zamenhofa tago en Evanstono.*

*La redakcio*

## Nova por ĉiam!

Gregory S. Dolgin

...Lasante tiun ĉi korton, mi rerigardis. Printempaj sunradioj heligis la monumenton. Ĝi aspektis kiel nova, ĵus kreita. Sub hela, haŭtkolora busto verdiĝis vortoj: kreinto de Esperanto. Kaj sube per etaj nigra-koloraj literoj: d-ro L. L. Zamenhof, skulptis odesano Vasilij Blaĵkov, 1957 jaro (al 70-jariĝo de la Lingvo Internacia). Samperiode en Sovetio aperis tiel nomata ottepelj (politika degelado). Reveninte malsana el stalinisma koncentrejo, kie li estis ekzilita nur pro sia amo al Esperanto, skulptisto Vasilij Blaĵkov sentis proksimiĝantan finon de sia vivo, tial li rapidis. Kaj ne havante rimedojn por akiri marmoron aŭ graniton, li konstruis en sia korto la rondan postamenton el betono, buston – gipsan, kaj farbigis la supraĵon por preventi ĝin kontraŭ iu ajn malseka influo. Baldaŭ post tio li forpasis. Tamen lia strebado al Perfekteco materialigis! Multaj homoj el diversaj landoj venas al ordinara odesa korto, kie loĝis la skulptisto kaj kie troviĝas tute ne ordinara lia kreaĵo. Tempo flugis. La monumento bezonis restaŭron kaj ĉiuprintempan farbadon. Ekde 1984 ĝis 1992 jaro okupiĝis



pri tio aŭtoro de l' rakonto, certe, kiel volontulo. Same – mezaprile 1987, kiam esperantistoj de la Tuta Mondo celebris jam 100-jaran datrevenon de la Lingva naskiĝo. Glora dimanĉo! Suno brilis. Ĉe la monumento aromis printempaj floroj, kreskigitaj far la najbaraj loĝantoj. Sonis Esperanto-muziko. Mi finis ĉi laboron, transvestiĝis kaj, forirante, rerigardis. „Adiaŭ, sinjoro!” – prononcis mi. Renkonten, kun sia aparataro eniradis kinoproduktistoj. Mi ĉiam evitadis objektivajn de kino- aŭ televid-aparataro, opiniante ke atenton meritas ne intervjuo babilado, sed sukcesa agado. Tial ankaŭ ĉi-foje mi forglitis el la korto kaj direktis min al marŝipa kasejo por ekscii la navigad-horaron, ĉar mi planis ferii sekvamonte en Krimeon. Ĉi kasejo, tiam sola en Odeso, troviĝis meze de Ĉemara bulvarado. Por atingi ĝin mi devis preteriri la faman Operan teatron. Tamen ĉe la teatro mian vojon baris stranga kavalkado: laŭ iom dekliva pavimo kuregis rad-latoj, sur kiuj balanciĝis „rajdantoj” – junuloj kaj junulinoj, akompanataj per dancritma muziko. Post ili ruliĝis aŭtomobilo aspektanta kiel mara vaporŝipo, el kies tubo, anstataŭ fumo, elflugadis diverskoloraj globetoj. Ĝin postsekvis aŭto, imitanta ŝipon dezertan – kamelon. Sur dorso de la kamelo sidis kisantaj geamantoj. Ambaŭflanke gaxis buntvestitaj statistikoj. Ravita, mi haltis kaj ĝuis la mirindan spektaklon. Sunsubiro de sovetia epoko subite ekflamigis iluzion pri libero, inspiris por humuro, amo kaj arto. Diversaj obstakloj, migrado el Ukrainio al Rusio kaj post kvar jaroj – en Usonon, ŝirmis en mia memoro la eventon. Pasis ankoraŭ 22 jaroj. La 7-an kaj la 9-an de septembro 2009 Ukrainia televid-programo, elsendata al Usono, montris ripete 2-partan filmon „Primorskij bulvar” (Ĉemara

bulvaro), produktita de Odesa kinostudio en la jaroj 1987-1988. Mi spektis ĉi filmon la unuan fojon. Neatendite por mi sur la ekrano aperis tiel konata Opera teatro, laŭ dekliva pavimo rapidis „rajdantoj”, bunt-vestitaj statistikoj kaj inter ili – ne-antaŭvidita de la reĝisoro „sovaĝulo”. Mi ne sukcesis deturniĝi, kaj la akra rigardo de la kinociklopo tuŝis ankaŭ min. Ĉu rekonebla iĝis mi dum ties kelk-sekunda kadro? „Rajdantoj”, gefianĉoj kaj statistikoj sin turnis al strato Deribasovskaja kaj al ties domo № 3 por foti ĉe la monumento feliĉan geedziĝon, scenaran kaj realan samtempe, por senti sin benitaj. Espereble, nova generacio de odesaj esperantistoj zorgas pri la Monumento. Sed en filmo „Ĉemara bulvarado” ĝi restos por ĉiam kiel nova, brilanta sub aprilandaj sunradioj de la jaro 1987, kiu celebris 100-jariĝon de Esperanto. Filmon „Ĉemara bulvarado” ornamas karesa maro, plenigas bondezira humuro, originalaj dancoj, feliĉa amo, strebado al perfekteco, estimo al majstro Lazaro Zamenhof kaj muziko, mirinda muziko! Dankegon al vi, odesanoj!



## Maigret - Esperante

La eldonejo “Sezonoj” (Kaliningrado, Rusio) ĵus eldonis libron ” Maigret eraras” de Georges Simenon (trad. Daniel Luez). Entute, oni eldonis pli ol 500 milionojn da ekzempleroj de la verkoj pri komisaro Maigret en kvardeko da lingvoj. En 1999 danke al Daniel Luez, al ĉi tiuj lingvoj finfine aldoniĝis ankaŭ E-o – per la romano “Maigret hezitas” (1968). La sukceso de ĉi tiu romano instigis la tradukanton kaj la eldonejon aperigi pliajn librojn pri Maigret en la IL. En “Maigret kaj la maljuna damo” (1949), kies E-traduko aperis en 2002, la komisaro forlasas Parizon kaj veturas al provinco por esplori komplikajn kazojn de servistino Roza, kiu supozeble mortis anstataŭ sia mastrino.

*Halina Gorecka*

## Adiaŭa Saluto de Puramo Chong

Karaj samideanoj , en la okazo de translokiĝo de mia laborejo kaj domo al Washington D.C, mi devas forlasi vin kaj jam adiaŭi nian asocion kun bedaŭro. Mi ne forgesos varman etoson de nia monata kunsido, kaj la vizaĝoj kaj afableco de niaj membroj ankaŭ ne estos forgesoblaj. Mi pardonpetas, ke mi ne plu povos helpi al vi per la redaktado kaj enpaĝigo de nia revuo, *Saluto*, kiun mi ĝuis kaj amis. Amike kaj samideane via.



## Gravaj Anoncoj

13an de Decembro – Zamenhofa tago okazos je kutima tempo (12:00 – 4 pm) en la salono de “SkyLine at Evanston”, 415 Howard St., Evanston, IL 60202.

Estas atendataj gravaj gastoj el la Ĝenerala Konsulejo de Respubliko de Pollando. Oni rajtas kunporti proprajn alkoholaĵojn.

## Adreso (provizora)

Esperanto Societo de Ŝikago  
p/a Viktor’ Pajuk  
8228 O’Connor Dr., # 2F  
River Grove, IL 60171  
(773) 344-2276  
[www.esperanto-chicago.org/](http://www.esperanto-chicago.org/)

## Estraro:

Prezidanto – Viktoro Pajuk  
Vicprezidanto – d-ro Puramo Chong  
Eksprezidanto – Roberto Stalzer  
Sekretario – Gertrude Novak, MD  
Kasisto – Karlo Gunn

## MEMBROKOTIZO

Membro-subtenanto ; \$40 jare;  
Familia membro : \$30, Regula: \$20  
Studenta aŭ pensiula: \$10.

Gifts are welcome also.  
Dues are needed for the routine expenses of the Society.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,  
Charles Gunn, 828 S. Ada St,  
Chicago IL 60607

## KUNSIDO

**okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:**

Sulzer Public Library, 4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL 60625-2101.  
Kunvenoj komenciĝas je 7 p.t. en la Suda Konferenca Salono, unua etaĝo.

